

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Verschiĝnt maandeliks
Achtĝnde jaargang
Nummer 3 (20)
M A A R T 1951

Vertegenwoordiger in Nederland:
LEEN
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

Orgaan van de
VLAAMSE ESPERANTISTENBOND
POSTBUS 342, BRUSSEL
Postrekening 2321.50 van V. E. B.

LIDGELDEN:
* Leden: 75 fr.
* Steunleden: min. 150 fr.
Inwonend leden: 25 fr.
(* met bondsorgaan)

ABONNEMENTEN:
België: 60 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

PROPAGANDO PER LA GAZETARO

La efektivigon de nia idealo: enkonduko de Esperanto en la praktikon, multe povas akceli propagando per la gazetaro, sed bedaŭrinde tiu grava propagandometodo, postulanta nur malmulte da libera tempo kaj preskaŭ neniujn financajn oferojn, ankoraŭ ne estas sufiĉe vaste aplikata.

Kvankam lastatempe la redaktoroj de gravaj periodaĵoj pli kaj pli konvinkigis pri tio, ke ne plu estas eble ignori nian celadon, gravaj komunikoj pri Esperanto ankoraŭ ne abundas en la gazetaro. Ne ĉiam antaŭjuĝoj rezultigas la malfavoran sintenon de pluraj redaktoroj. La silentadon kelkfoje kaŭzas nescio kaj tiuokaze intervjuo kun iu el la redaktoroj aŭ alsendo de klarigaj broŝuroj povas efiki favore. Ofte ankaŭ manko de tempo ludas rolon. Ne ĉiuj redakcioj havas la okazon sendi raportiston al niaj kunvenoj, ĉar okazas ja multaj kunvenoj, pli gravaj ol niaj! Tiuokaze ni mem zorgu pri alsendo de konciza raporto tuj post la kunveno (ne kelkajn tagojn poste!). Ni scias, ke kelkaj aktivuloj regule sendas komunikojn al la loka gazetaro, sed fakte ĉi tiu sekcio devus elekti raportiston, kies tasko estas, regule sendi materialon al la redakcioj. „Ho, ni jam ofte klopodis pri tio, sed ĉiuj komunikoj niaj ja malaperas en la redakciajn paperkorbojn”, estas la ofte aŭdata plendo. Sed kelkfoje la esperantistoj ja mem kulpas pri tio. Jes, vere, en la sekcia festvespero vi gajnis grandan kukon kaj la himno estis kantata tiel belsone, ke tio meritigas honoran mencio, sed ĉu vi vere kredas, ke ne-esperantistoj interesiĝas pri tiaj bagatelaĵoj? Oni havigu al la redaktoroj nur ĝeneralinteresaĵojn komunikojn, sciigojn pri enkonduko de Esperanto en lernejojn, k.t.p. Ju pli koncizaj la sciigoj, des pli bone. Kelkfoja enpresigo de mallongaj sciigoj efikas pli ol unufoja apero de longa artikolo, ĉar regule la legantoj estu atentigataj pri nia afero.

Oni ne forgesu sendi komunikojn ankaŭ al fakaĵ kaj asociaj periodaĵoj. Pere de niaj delegitoj kaj eksterlandaj korespondantoj ni ja ofte povas havigi al la redaktoroj de tiaj organoj novaĵojn kaj sciindaĵojn koncernantajn speciale ilian fakon! Oni utiligu tiajn eblojn kaj komprenoble ne forgesu pretere mencii, ke la novaĵoj estas akiritaj pere de Esperanto. Ne subtaksu la valoron de tiu propagando!

Multaj junularmovadoj kaj mezgradaj lernejoj havas propran periodaĵon. Ĉu vi jam imitis la bonan ekzemplon de s-ro S.S. de Jong, kies artikoloj pri Esperanto volonte estis akceptataj de la redakcioj de kelkaj lernejaj gazetoj? Eble tiaj stencilitaj folietoj kun negranda eldonkvanto ŝajnas al vi sensignifaj, sed ofte la abonantoj legas ilin pli atente ol gravajn ĵurnalojn.

INTERNACIAJ SOMERAJ KURSOJ 27 JULI—2 AUGUSTO SOESTERBERG (NED.)



Konferencio „Ned. Protestanten Bond”, Soesterberg.
Konversacia Salono

En la kadro de la someraj aranĝoj de „Flandra Ligo Esperantista” kaj „La Estonto Estas Nia” okazos 3 kursoj, nome: *konversacia kurso*, kiun gvidos s-ro A. Weide (Germanujo), destinita por ĉiuj kiuj deziras plibonigi sian parolkapablon; *seminaria kurso*, destinita por estontaj kursgvidantoj kaj funkciuloj en la movado, kiun gvidos s-ro mag. A. J. Kalma (Nederlandoj) kaj *literatura kurso* kun lekcioj pri literaturo, historio, tradukarto, k.t.p., kiun gvidos s-ro d-ro T. v. Gindertaelen (Flandrujo).

Oni povas laŭplaĉe partopreni unu, du aŭ tri kursojn, ĉar ne okazos pli ol unu kurso en la samaj horoj, sed se oni preferas ĝui ripozon aŭ promenadon, oni partoprenu event. nur la ekskursojn kaj vesperajn aranĝojn konsistantajn el prelegoj kaj artaj kaj amuzaj prezentadoj.

Kurskotozo kaj prezo por la restado kaj ĉiuj manĝoj g. 36.— (se oni deziras tranokti en dupersona ĉambreto oni krompagu g. 4.—). Ĉe aliĝo oni pagu g. 18.— per postkonto 70215 de „Administrateur Zomercursus L.E.E.N.”, Deventer; la reston tuj post alveno en la konferencio.

Petu senpagan detalan prospekton de s-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstr. 2, Deventer, la ĝen. sekr. de L.E.E.N., s-ro A. J. Kalma, la ĝen. sekr. de Fl. L.E., s-ro G. Maertens, aŭ la sekretarioj de la lokaj sekcioj.

Necesas multe lerni por kompreni ke oni malmulte scias.

Montaigne.

Kiu scias ĉu ne vivi estas morti kaj morti vivi?

Euripido.

Amo estas bela anĝelo, sed ofte bela mort-anĝelo por la kredema, trompita koro.

Stifter.

El aflikto ekestas granda karaktero.

Stifter.

Havante korvundon, tuŝu ĝin same malmulte kiel malsanan okulon. Kontraŭ doloroj de l' animo estas nur du kuraciloj: espero kaj pacienco.

Pythagoras.

don, oni partoprenu event. nur la ekskursojn kaj vesperajn aranĝojn konsistantajn el prelegoj kaj artaj kaj amuzaj prezentadoj.

Kurskotozo kaj prezo por la restado kaj ĉiuj manĝoj g. 36.— (se oni deziras tranokti en dupersona ĉambreto oni krompagu g. 4.—). Ĉe aliĝo oni pagu g. 18.— per postkonto 70215 de „Administrateur Zomercursus L.E.E.N.”, Deventer; la reston tuj post alveno en la konferencio.

Petu senpagan detalan prospekton de s-ro C. B. Zondervan, Sweelinckstr. 2, Deventer, la ĝen. sekr. de L.E.E.N., s-ro A. J. Kalma, la ĝen. sekr. de Fl. L.E., s-ro G. Maertens, aŭ la sekretarioj de la lokaj sekcioj.

AKTOROJ KAJ ESPERANTO

En mia artikolo sub supra titolo, aperinta en la antaŭa numero, mi menciis ke Louis Bertrijn ludis la rolon de „Jan” en la kvarakta versa teatraĵo „Kaatje” de la franc-belga aŭtoro Paul Spaak (1870-1936), la patro de la nuna belga ŝtatestro. Efektive en la eldono „Hachette”-1911 (Kolekto de la Revuo) de la Esperanta traduko, fare de d-ro W. van der Biest, oni tion anoncis, sed fakte la rolo estis ludata de Jules Verstraete. La reĝisoro estis Arie van den Heuvel.

Jules Verstraete kaj Helène Bertrijn ankaŭ ludis la rolojn de „Lancelot” kaj de la Reĝino en la poezia teatraĵo de d-ro Privat, „Ginevra”, dum la 9-a internacia kongreso en Berno (1913). Kiel amatoroj partoprenis i.a. s-ano Jan Jacobs, nuna prezidanto de la antverpena sekcio de Fl.L.E., kiu estis „tre lerta, fortvoĉa „Modredo”, kaj la mortintaj antverpenaj pioniroj apotekisto Oscar van Schoor kaj Frans Schoofs. „Ĉiuj perfekte ludis kaj prononcis”.

La unuaj du krome partoprenis en la oratora konkurso. Pri Jan Jacobs, „helmiĉa kaj kvietaj” raportis la gajninto de la 1-a premio, René Charles Pichon el Parizo, en „La Revuo”, ke „lia voĉo estas forta, bonsona, ne ĉiam egala”.

(Tyneverum).

Wereldnieuws

In Kopenhago verden de afgelopen winter 24 Esperanto-cursussen gegeven waarvan 21 van regerings- of gemeentewege werden gesubsidieerd.

Het vakverbond voor spoorwegpersoneel in Finland (15000 leden) heeft Esperanto-cursussen in zijn programma opgenomen. Het orgaan van deze vereniging bevat een schr. cursus.

In Hamburg wordt door 265 politie-beambten aan Esperanto-cursussen deelgenomen. Een veertigtal draagt reeds officieel de Esperanto-ster.

Het te Geneve gehouden congres voor een wereldparlement werd door de voorzitter dr E. Privat geopend in het Frans, Engels en Esperanto. Van laatstgenoemde taal bedienden zich ook de afgevaardigden van Egypte en Israël, terwijl door verschillende gedelegeerden de wenselijkheid werd bepleit, voor een gedeelte van het volgende congres alléén Esperanto als voertaal te gebruiken.

In China is de Esperanto-beweging herleefd. Radio Sjanghai verzorgt drie maal per week een uitzending in of over Esperanto.

Op verzoek van de Independent Labour Party hield de voorzitter van de Britse Esperanto-Bond een inleiding over Esperanto op het partijcongres, gehouden 31-7-50. Het partijorgaan „Socialist Leader” bevat een wekelijkse Esperanto-rubriek.

In Japan wordt Esperanto gedoceerd aan de universiteiten te Osaka, Kobe en Otami. In verschillende Japanse leerboeken ten dienste van het middelbaar onderwijs is een artikel gewijd aan dr Zamenhof en Esperanto.

De Braziliaanse Esperanto-Bond wordt geregeld gesubsidieerd door de Federale Regering. In Pernambuco worden momenteel 19 cursussen gegeven, deels aan universitaire instellingen, terwijl de gemeenteraad van Santos (Sao Paulo) Esperanto als leervak heeft ingevoerd op het plaatselijk Handelsinstituut.

DIFINOJ PRI LA MALSANOJ (daŭrigo)

En la antaŭa artikolo (febr. 1951) ni i.a. esploris la *kaŭzojn* de malsanoj; ni tiam pritraktis la *eksterajn* kaŭzojn kaj nun ni konsideru la *internajn* kaj la *sociajn*.

La unuaj estas kaŭzoj kiuj troviĝas en la korpo mem kaj kies intima naturo estas plej ofte nekonata. Ili povas rilati al:

1/ *heredito*: kelkaj malsanoj estas rekte hereditaj (ekz. la sifiliso); koncerne aliajn malsanojn estas heredita nur certa antaŭdestino (oni heredas nur la „terenon”, kiel ekz. ĉe tuberkulozo, astmo, kancero, mensaj malsanoj);

2/ *ago*: pluraj malsanoj estas propraj al difinita ago. La unuajn vivojarojn karakterizas diversaj nutraj malhelpoj. La infanaĝo estas tiu de la angla malsano aŭ rahito. Post la puberigo sekvas la jaroj en kiuj precipe aperas la tuberkulozo. Dum la plenaĝo ekzistas minaco pri la grava kancero. Finafine maljunuloj ofte suferas arteriosklerozon kaj ĝiajn sekvojn;

3/ *raso*: kelkaj rasoj tre facile akiras iun malsanon sed aliaj estas tute indiferentaj al ĝi; ekz. la negroj tre facile akiras tuberkulozon; oni kontraŭe preskaŭ ne notas ĝin ĉe la judoj.

4/ *konstituciaj tipoj*: tiu nocio ampleksas la karakterizilojn de la homa korpo kaj ĝiaj funkcioj. Oni distingas diversajn tiajn tipojn: a/ la spiradotipoj: kun granda, larĝa torako, forta nazo kun larĝa bazo; b/ la digestadotipoj: kun granda mentono, mallonga kolo, forte disvolvita ventro; c/ la muskoloj tipoj: kun harmonia disvolviĝo de la muskoloj, larĝaj ŝultroj, malgrasa ventro; d/ la spinaj tipoj: kun forta disvolviĝo, delikata korpa disvolviĝo sed kun granda kranio.

Oni uzas ankaŭ alian dividon, nome tiun de Kretschmer, kiu precipe priskribas tri tipojn: a/ astena tipo: mallarĝaj ŝultroj, maldikaj brakoj, longa, ebena torako, maldika ventro kaj neniam gras-amaŝiĝo. Oni kelkfoje nomas tiun tipon la pretuberkuloza tipo, kvankam tiu malsano povas aperi ĉe ĉiuj konstituciaj tipoj. b/ atleta tipo: forta disvolviĝo de la skeleto kaj de la muskoloj. c/ piknisa tipo: forta disvolviĝo de la kapo, brusto kaj ventro, gras-amaŝiĝo sur la trunko, mallonga kolo kaj delikataj membroj. Ĉi tiu tipo estas identa kun la artra aŭ apopleksia tipo.

5/ *sekso*: kelkaj malsanoj (ni neglektas tiujn de la seks-organoj) ŝajnas precipe ligitaj al iu aŭ alia sekso. Tiel, la stomak-ulcero kiu plej ofte aperas ĉe viroj, la galŝtonoj pli kutimaj ĉe virinoj, kaj la kancero de la traĥeo pli specifa ĉe la viro.

Sociaj kaŭzoj:

Pluraj sociaj faktoroj povas favori malsaniĝon laŭ la malrekta vojo de eksteraj aŭ internaj faktoroj. Ekzemple 1/ la profesio: certaj korpaj profesioj estas submetataj al la enspiro de polvo (pneŭmokokozo); alia al la manipulado de plumbo (kompotistoj, pentristoj). Kelkaj cerbolaborantoj ofte suferas fizikan ekscitiĝon; tre okupata vivo kun pezaj respondecoj povas kaŭzi kormalsanojn. 2/ la nutrado: manko de aŭ tro da certaj nutraĵoj povas kaŭzi malsanon (la skorbuto de la maristoj pro manko de vitaminoj C; artrito pro abunda manĝado de ĉasaĵoj kaj trinkado de vino, la t.n. „malsano de la notarioj”); 3/ la loĝejo: astmon povas kaŭzi la loĝado en iuj domoj aŭ regionoj; en la montaraj regionoj de Svisujo oni renkontas la kropon (tumoron de tiroideo) pro manko de jodo en la trinkakvo.

TEDDY.

Sen rideto venas la homo; sen rideto li foriras, tri rapidajn minutojn li estis feliĉa.

Jean Paul.

Plej alta saĝo estas: vivante fari kion ni mortante estus esperintaj fari.

Douwes Dekker.

La konscienco: la koro de nia koro.

Newmann.

OBSERVOJ

KOMPATINDAJ KOBANOJ !



Esperanto estas lingvo helpa, en tiu senco ke ĝi celas estila komunikilo inter homoj de diversaj nacioj. En la Zamenhofa kaj ĝenerala esperantista koncepto, ĝi do neniel celas la lokon de lingvo hejma, krom eble ĉe geedzoj de malsama nacieco. La Zamenhofa familio neniam uzis Esperanton en propra rondo, krom ekzercocelo dum difinitaj momentoj.

Mi ne volas trotaksi kelkajn sporade konstateblajn ekscesojn. Tamen, mi sentis egan kompaton, kiam, antaŭnelonge, kun evidenta fiero, esperantistaj geedzoj prezentis al mi proprajn infanetojn, kiuj en Esperanto konversacias kun la patro, en alia fremda lingvo kun la patrino, kaj lernas la nacian, poste, en la lernejo.

Kompatindaj cerbetoj, de kiuj senpripensaj gepatroj pro duba vanto postulas trioblan fortostreĉon ! Tri-, kvarjaraj poliglotoj „barnumoj” eble vekas nian miron, nian admiron - ne !

Laŭ sana pedagogia koncepto la antaŭa, funda scio de la nacia lingvo estas la firma bazo por bone ekvilibrita mensa disvolvigo. Nia esperantista fervoro ne konduku nin al troa fervoro, kiu perdigu al ni el vido, ke el nia tuta intelektta arsenalo nia nacia lingvo estas kaj restas la instrumento kiun ni pleje bezonas, kaj kiu do rajtas niajn specialajn flegon kaj atenton.

Pik.

HILVERSUMA KONGRESO ALIGIS ĜIS 15-II

1, 2 s-ro P., sino J. Hoop, Leiden, 3, 4 s-ro J., sino M. de Back, Den Haag, 5 s-ro P. Mabeoone, A'dam, 6 s-ro R. Kuiper, Enschede, 7, 8, 9, s-ro C., sino E., fino C. Zondervan, Deventer, 10 s-ro C. Keur, Den Haag, 11 s-ro H. Baljet, Oegstgeest, 12 sino A. Scholten, Den Haag, 13 s-ro F. v. d. Meer, Berlikum, 14 s-ro A. de Vries, Soest, 15 fino A. Hellinx, 16 fino M. König, 17 fino S. Visser, ĉiuj en Hilversum, 18,19, 20,21, s-ro H., sino J., fino E., s-ro J. Blokner, Heemstede, 22 fino J. v. d. Snoek, Amersfoort, 23 fino C. Zorgdrager, Amerongen, 24,25 s-ro E., sino C. Burk, A'dam, 26 sino J. Ravestein, Den Haag, 27 fino H. Aukes, Leiden, 28 s-ro F. Weeke Den Haag, 29 s-ro H. Hansen, Woerden, 30 s-ro J. Telling, R'dam, 31 fino S. Buwolda, Hymert, 32,33 s-ro A., sino C. Bueno de Mesquita, 34,35 s-ro H., sino G. Hendriksen, 36,37 s-ro E., sino M. Wegelin, 38 sino E. Gunst, 39 sino W. Bottema, 40 sino H. de Boer, 41 sino M. Hofland, 42 sino L. de Wit, 43,44 s-ro A., sino A. H. Hendriksen, ĉiuj en Bussum, 45 s-ro H. Mees, 46 s-ro Th. Mangener, 47 fino A. Conselaar, ĉiuj en Watten-scheid (Germ.), 48 s-ro J. Duyvetter, Huis ter Heide, 49 sino Sanders, Den Haag, 50 s-ro W. Hölzenspies, Baarn, 51,52 s-ro M., sino E. Nawijn, Den Haag, 53,54 s-ro A., sino P. v. Wijnen, Zeist, 55, 56 s-ro J., sino G. Chapellier, Nancy (Fr.), 57 fino E. Bernard, Leiden, 58,59 s-ro H., sino C. Behr, Groningen, 60 fino E. Ploeger, Hilversum, 61,62 s-ro L., sino M. Staal, Amersfoort, 63 s-ro B. Slingers, A'dam, 64 s-ro P. Moen, Den Haag 65, s-ro P. Samijn, Roeselare (Flandr.), 66 fino D. Kappert, Veendam, 67 s-ro P. Korte, Veendam, 68 s-ro N. Beun, Haarlem, 69 sino E. Kok, Naarden.

Aligis ĝis 25-II jam 109 !

VLAAMSE KAMPEERDERS

Kent U de kampeeraĵdeling van de Vlaamse Toeristenbond ? Zij verschaft aan haar leden alle gewenste inlichtingen betreffende terreinen, trektochten, kampen en het kamperen in het algemeen, in binnen- en buitenland. Zij heeft in het binnenland een honderdtal aangesloten terreinen, waarvan ieder hoofdlid de lijst ontvangt, met de aanduiding van de praktische en toeristische bijzonderheden. Zij licht U in over honderden terreinen in het buitenland, waar U in de beste voorwaarden uw tent kunt opslaan. Zij organiseert in binnen- en buitenland, kampen en trektochten, die U laten genieten van de vrije natuur en Vlaamse gemoedelijkheid. Zij verdedigt de belangen van de kampeers bij de openbare besturen en de terreineigenaars. Zij bestrijdt de misbruiken in het kampeerwezen en brengt het in hoger aanzien bij de bevolking. Zij behartigt de zedelijke belangen van ons volk, door een streven naar een gezond en zedelijk kamperen. Zij verzekerit haar leden voor de burgerlijke aansprakelijkheid tegenover derden, gedurende hun kampeertochten. Verdere inlichtingen op het sekretariaat : Vlaamse Kampeertoeristen, Kalandenbergh 7, Gent.

LA STUDANTO

Uitwerking van de opgaven in het vorige nummer :

Frateco — arestito — malpurajo — malbonodora — samurbano — suferigi — vidindaĵoj — fundamenta — katastrofa — nuksoŝelo — nesubtaksenda — postmangaĵo — aĉetebla — markolo — fruktodona — ŝaktabulo — promenato — senŝeligi pomon — nemangebla — ostaro — sangelfluo — frandaĵo — kolharoĵ — bofilino — mispaŝo — krimulo — trovito — bofrato — plenumigi — teksilo — aglido — riproĉinda (mallaŭdinda) — mortideva — mokemo — hon-tinda (malhonora) — subaĉeti — febroforiga (kontraŭfebra) — transloĝigi — termezuristo — supermezura — maturigi — publikigi — ridegi — batalpreta (batalpova) — legantaro — arkitektura.

1. Adiaŭinte nin (post kiam li adiaŭis nin), li forlasis Bruselon, la ĉefurbon de Belgujo kaj foriris al Amsterdamo, kie li estis pasigonta parton de sia libertempo (ferio).

2. La butikisto diris al mi, ke la kuleroĵ, kiujn mi elektis, kostas po dek guldenoj por dekduo. Ĉar mi opiniis (trovis) tiun prezon tro alta (bep. van gesteldheid), mi demandis al li, ĉu li ne havas malpli multekostajn kulerojn.

3. Ĉu vi jam estis iam en Hilversumo ? Ne, sed okaze de la kongreso de F.L.E. kaj L.E.E.N. mi esperas viziti tiun urbon kun ĝiaj multaj vidindaĵoj.

heb ik niet. 6. De jongen gooide de kat in het water om hem te verdrinken. Na enige minuten was het arme dier verdrongen. 7. Hoe vaker gij u oefent, hoe beter gij Esperanto leert spreken. 8. Vader voelde zich ziek en ging dadelijk naar huis. Hij was echter weldra hersteld. 9. Kende ik u niet beter, dan zou ik denken, dat u loog. 10. De een en twintigste Maart begint de lente. 11. Hij vertelde me, dat hij onderwijzer wilde worden. 12. Ik weet, dat het moeilijk is, zo'n zware vracht te tillen.

En la literaturo, precipe en sciencaj kaj teknikaj verkoj la legantoj kelkfoje renkontas afiksojn, ankoraŭ ne oficialigitajn, kiujn oni ofte vane serĉas en elementaj lernolibroj. Ni ĉisube pri-traktos la plej ofte uzatajn :

enda : sufikso indikanta ion, kio devas esti farata, ekz. : skribenda letero (een brief, die geschreven moet worden); imitenda ekzemplo (een voorbeeld, dat nagevolgd moet worden).

hiper : prefikso, signifanta en plej alta mezuro (grado), ekz. : hipermoderna (hypermodern); hipersaturi (oververzadigen).

iko : sufikso, derivanta la nomon de scienco, okupiĝo k.t.p. el la nomo de la resp. scienculo, ekz. : retoriko; poetiko; stilistiko.

io 1 : sufikso por landnomoj, ankoraŭ ne oficialigita, sed ofte uzata anstataŭ

VERDLANDO VOKAS

Por gajni lokon en niaj Esperanto-organoj ni ne plu aperigos la spacoraban liston de Esperanto-disaŭdigoj. Ĝi ankoraŭ estis presata en la antaŭa numero de ĉi tiu organo, kiun vi do eventuale konsultu. Cetere la informoj estas pli facile troveblaj en la radioprogram-revuoj ĉe la programo de la koncerna tago. Krom „De Radiogids” (V.A.R.A.), „De Radiobode” (A.V.R.O.) kaj „Katholieke Radiogids” (K.R.O.) nun ankaŭ „Vrije Geluiden” (V.P.R.O.) regule enpresigos la informojn pri la Esperanto-disaŭdigoj. Nur „Omroepgids” (N.C.R.V.) ankoraŭ hezitas enpresigi ilin. Geabonantoj de tiu revuo bonvolu afable peti la redakcion akcepti nian proponon.

Bonvolu noti, ke Sofia de nun elsendos dimanĉe, merkrede kaj vendrede 19.00-19.15 je ondlongo 39,11 m.

Radio Roma, la 1-an, 2-an kaj 4-an vendredojn preleĝoj pri la „Dia Komedio” de Dante.

La esperantistoj havas la elsendojn, kiujn ili meritas, do montru vian interesiĝon, sendante al la aŭskultita stacio vian skriban aplaudon aŭ kritikon, eĉ se nur per simpla poŝtkarto.

Jen kelkaj adresoj : Radio Roma, Esperanto, Via Vittorio Veneto 56, Roma. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV. S.R.G., Kurzwellendienst, Neuengasse 28, Bern. Radiodiffusion Française, Lille-Nord, Fr. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum. V.A.R.A., Heuvelaan 33, Hilversum.

Informojn pri Esperanto-radio-elsendoj sendu ne nur la radio-stacioj, sed ankaŭ la radio-aŭskultantoj al : S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, Tjerkerwerd (Fr.), Nederlando.

AMUZA MISKOMPreno

La angla ministro por nutraj provizoj, Maurice Webb, kiu troviĝas nun en Danujo, kiel gasto de la danaj agrikulturo-organizo, fariĝis viktimo de gaja miskompreno.

Unu el la matenaj ĵurnaloj en Kopenhago anoncis la viziton de la ministro per la jena surskribo :

„Englands mad minister i Kobenhavn.” La vorto „mad” en dana lingvo signifas „nutraĵo”.

Legante la vorton „mad”, Maurice Webb iom ektimigis, ĉar angle „mad” signifas „freneza”. Tial en sia oficiala parolado li devis konfesi hieraŭ, ke trafis lin malagrabla esti priskribata oficiale kiel „freneza” ministro, sed jam baldaŭ li eksciis kion efektive signifas „mad” por la mangemaj danoj.

Laŭ sciigo en „HET PAROOL” Trad. J. Rooker.

SOMERAJ ARANĜOJ

Huttwil (Emmenthal, Svisl.); feria semajno kun progresiga kurso 22/IV-29/IV. Informoj: s-ro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn (Svisl).

Lausanne: internacia renkontiĝo, 19/VII — 22/VII. Informoj: s-ro P. Arbenz, rue Couchirard 8, Lausanne.

Hamburg; internaciaj Esperanto-tagoj 31/VII — 2/VIII. Informoj: Hamburga Esp.-Societo, Isestrasse 79, Hamburg 13.

Konstanz; int. feria semajno kun perfektiga kurso 28/VII — 4/VIII. Informoj: I.F.S. Esperanto, Grünyang 2, Konstanz (Germ.).

INTERNACIAJ FERIAJ KURSOJ

okazos 22-29 julio en Helsingör (Danlando)

Karavano el Nederlando arangata de s-ro P. Mabeoone, Pythagorasstr. 122, A'dam-O.

Detala prospekto ĉe L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj (Dan.)

spodig bleek echter, dat de vrees van de gramofoonplatenfabrikanten ongegrond was, daar de radio de verkoop van goede platen juist heeft bevorderd.

Tussen de dreiging van een nabije oorlog en de belofte van een zorgeloze vrede ligt een derde mogelijkheid, die misschien de meest waarschijnlijke is : een langdurige periode van niet zorgeloze maar zorgenvolle en onzekere vrede.

Uitwerkingen van Vlaamse cursisten voor 20 Maart aan V.E.B., Studento, postbus 342, Brussel; van Nederlandse cursisten aan A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Z.

KOMUNIKOJ DE LA LIBRO-SERVOJ.

| | Gld. | Belg. Fr. |
|---|------|-----------|
| Fundamenta Krestomatia de Zamenhof (bind.) | 5,20 | — |
| Esperanta Krestomatia (kart.) | 1,50 | 24,— |
| Fabeloj de Andersen III, trad. Zamenhof | 2,30 | — |
| Rabistoj de Schiller, trad. Zamenhof | 2,30 | — |
| La Konsilanto de Degenkamp (nur 2 ekz.) | 1,65 | — |
| Tra la labirinto de la gramatikoj de Faulhaber, (bind.) | 5,90 | 85,— |
| Rembrandt, la magiisto, (bind.) | 5,— | 68,— |
| La naŭveco de pastro Brown | 4,50 | — |
| La nevenkebla ĝeno | 4,90 | 67,— |
| Miru-Pensu-Ridu, de P. Bennemann, (bind.) | 4,80 | 65,— |
| Kredu min, sinjorino!, de C. Rossetti, (bind.) | 4,80 | 65,— |
| La vojoj estas nekonataj, (bind.) | 2,50 | 34,— |

Ekkonu la mondon pere de la Esperanto-literaturo :

| | | |
|--|------|-------|
| Aŭstralio, lando kaj popolo | — | 40,— |
| Akbar | 3,50 | 48,50 |
| Bengalaj fabeloj | — | 5,50 |
| Ĉe la sanktaj akvoj romano, (2 volumoj kune) | 6,— | 66,— |
| La Fino, de F. Bernadotte | 2,45 | 30,25 |
| Faktoj pri Danlando | 1,50 | 20,— |
| Hindo rigardas Svedlandon | — | 41,25 |
| La homaj rasoj de la mondo (riĉe ilustrita) | 3,40 | 36,— |
| Tra sovaĝa Kamĉatko | 4,90 | 50,— |
| Mia vojaĝo en Sovetio | — | 37,50 |
| La hispana tragedio | 2,90 | 40,— |
| Tipoj kaj aspektoj de Brazilo (broŝ.) | — | 50,— |
| La Juda ŝtato | — | 45,— |

MENDU ĈE

Boekendienst L.E.E.N., Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, (giro 76915)
 Vlaams Esperanto-Instituut, Blankenberge steenweg 72, Brugge (p.c.r. 3268.51)

Leeghoofd — je slaat de spijker op de kop! — hij is niet goed snik — weten van horen zeggen — tegenstrijdige berichten — met andermans veren pronken — licht geraakt zijn (gaw op z'n teentjes getrap zijn) — zingen uit volle borst — de gedachte schoot (flitste) door m'n hoofd — blootgesteld zijn aan gevaren — ziende blind — waar zal dat op uitdraaien? — dag aan dag — om de andere dag — hekelicht — dat zal je berouwen! — iemand in de maling nemen — zich ergens aan te goed doen (zich ergens op tracteren) — hardvochtig — tegenstrijdige berichten — er is geen andere uitweg — hij denkt, dat hij de wijsheid in pacht heeft — gunstig bekend staan — botweg weigeren — iemands woorden verdraaien — effen stof — iemands liefde beantwoorden — bij iemand uit de gunst raken — ieder vogeltje zingt zoals het gebekt is — kind nog kraai op de wereld hebben — de keerzijde van de medaille.

Iu malliberulo estis trovinta la eblon (sukcesis) forkuri (eskapi). Feliĉe oni faris kiam li eniris la malliberejon, ses diversajn foto(grafaĵojn) de li tiel ke oni povis provizi ĉiujn policojojn per sufiĉe da rekoniga materialo. Post kelke da tagoj venis el malgranda vilaĝo telegramo de la loka policano (ĝendarmo) : „Arestis kvin el la ses forkurintoj (eskapintoj). Versajne (probable) la sesa sekvos morgaŭ.”

Vertaal :

1. Men noemt China het land van de rijzende zon. 2. Hij is even oud als zijn zuster maar twee jaar jonger dan zijn broer. 3. Wat is het hier koud. 4. Reeds weken lang verheugden de kinderen zich op de naderende vakantie. 5. Zoveel geld, als hij uit kan geven,

ujo, ekz. : Polio ; Germanio ; Hispanio ; Skandinavio. 2 : sufikso, derivanta la nomon de scienco, okupiĝo, sistemo k.t.p. el la nomo de la resp. scienculo, reprezentanto aŭ adepto, ekz. : filozofio ; biografio ; biologio ; astronomio ; filantropio ; pedagogio ; demokratio ; anatomio.

ito : sufikso, derivanta la nomon de inflamo el la nomo de la resp. organo, ekz. : bronkito ; pleŭrito ; laringito ; apendicito.

iva : sufikso, signifanta : -kapabla, -pova, ekz. : kondukiva (geleidend) ; produktiva (productief) ; kreiva (met scheppend vermogen, creatief) ; elvokiva (met beeldende kracht, evocatief).

izi : sufikso, signifanta : science aŭ metie kovri aŭ provizi ion per io aŭ apliki metodon de eltrovinto, ekz. : stan(iz)i (vertinnen) ; gudr(iz)i (teren) ; pasteŭrizi (pasteuriseren) ; galvanizi (galvaniseren).

oza : sufikso, signifanta : -plena aŭ -riĉa kaj indikanta materian multhavecon, ekz. : poroza (poreus) ; sukoza (sappig) ; feroza (ijzerhoudend).

retro : prefikso, signifanta : kontraŭe al la kutima direkto, ekz. : retroiri (teruggaan), retroklini la kapon (het hoofd achterover- of terugbuigen).

Vertaal :

Keek men een tiental jaren geleden op de wereldkaart, dan zag men nog een groot aantal witte vlekken : onbekend land, waar nog nimmer een blanke was doorgedrongen, land, dat in elk geval nog niet in kaart was gebracht en over welks geheimen de natuurvorsers zo goed als niets wisten.

Toen de radio haar intrede deed, scheen het aanvankelijk, dat deze de gramfoon geheel zou verdringen. Al

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst: Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160. Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563. Boekendienst, schr. cursus voor gevorderden en dipl. B: H Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom, postrek. 76915. Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht. Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320. Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp Cefdel. U.E.A.: P. Moen, Schaarsbergenstraat 104, Den Haag, postrek. 79167.

KOMUNIKOJ DE LA ĈEFESTRARO

La sekcijaj kasistoj kaj ĝeneralaĵaj membroj bonvolu kiel eble plej baldaŭ pagi la kotizon por la unua duonjaro 1951 per poŝtkonto 34563 de la ĝen. kasisto de L.E.E.N.

Al ĉiuj sekcioj ni sendis la formularon por la delegitoj al la jarkunveno. La supran duonon la sekcijaj sekretarioj resendu al la ĝen. sekretario antaŭ la 20-a de aprilo.

EKZAMENA KOMITATO

Prez. s-ro G. J. Degenkamp, sekr.-ino f-ino H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29, Badhoevedorp. Vicprezidantoj: s-roj H. A. de Hoog, mag. A. J. Kalma kaj d-ro W. Manders.

Ekzamenoj A kaj B okazos: La 3-an de majo (Ĉielirtagon) en Amsterdam kaj Leeuwarden; la 16-an de junio en Hago kaj la 3-an de novembro en Utrecht.

Prospekto senpage havebla ĉe la sekretario de la ekz. komitato kaj la ĝen. sekr. de L.E.E.N.

PROF. D-RO IVO LAPENNA

Por ke ĉiuj anoj estu informitaj pri la lokoj, kie prelegos prof. d-ro Ivo Lapenna, ni ĉi sube publikigas ilin, menciante krome adresojn de personoj, kiuj povas doni informojn pri la ĝusta horo, ejo, enirprezo, k.t.p.

Lundon 5/III Leiden; f-ino E. Bernard, Herenstraat 8, Leiden.

Mardon 6/III Amsterdam; ejo: „Vrije Gemeente”, Weteringschans, vespere 20 h.; s-ro J. Rooker, Lomanstr. 43, I, A'dam-Z.

Merkredon 7/III Haarlem; f-ino E. Blokker, Bronsteeweg 26, Heemstede. Jaŭdon 8/III Leeuwarden; s-ro K. Paasman, V.v. Goghstraat 41, Leeuwarden.

Vendredon 9/III Groningen; s-ro H. Behr, Turfsingel 72 b, Groningen.

Sabaton 10/III Eindhoven, posttagmeze 15.30 h. ejo: Philips Ontspanningsgeb. s-ro J. Mols, Genniperweg 34, Eindhoven.

Lundon 12/III, Utrecht: s-ro Chr. Sluiper, Homerustaan 52, Utrecht.

Merkredon 14/III, Arnhem; s-ro H. Arends, Gravenstraat 16, Arnhem.

Jaŭdon 15/III, Den Haag; ejo: Schoolmuseum, Heemsterhuisstr.; f-ino J. B. Lehnen, Anjelierstraat 10, Den Haag.

Sabaton 17/III, Rotterdam; f-ino M. C. Diener, Mathenesserdijk 238, R'dam.

ASOCIA JARRAPORTO

- LA ESTONTO ESTAS NIA -

(daŭrigo)

Tiajn malagrablajn surprizojn oni povas facile eviti, se la sekcijaj kasistoj enkasigas la kotizojn tuj komence de ĉiu kvaronjaro.

En kelkaj sekcioj la kasistoj ne enkasigas la kotizojn ĉiun kvaronjaron, sed ĉiujmonate aŭ eĉ ĉiusemajne. La sekcijaj kotizoj varias de g. 2.50 ĝis g. 12.50 (laŭ ni tro alta) en jaro; plej ofte la jarkotizo estas g. 6.— aŭ g. 8.—. Estas evidente, ke sekcioj kies kotizo egalas la kontribuon ĉiujare ŝuldatan al la ĝen. kaso aŭ eĉ estas malpli, tute ne povis fari ian propagandon. (Eble oni mem tie fabrikas la mankantajn monerojn?) En kelkaj sekcioj oni ne propagandis, „ĉar la anoj ne ŝatas tion”. Eĉ la demando: „Ĉu vi regule sendas artikoletojn al la loka gazetaro?” kelkaj sekcioj respondis nee; en unu el la sekcioj „neniu el la anoj ŝatas fari tiun laboron”. Unu el la sekretarioj respondis, ke oni kutime uzas la nederlandan lingvon en la kunvenoj, „ĉar la anoj ne ŝatas studi”. Alia sekretario plendas pri tio, ke la spertuloj preskaŭ neniam ĉeestas la „interbabiladojn” (nederlandlingvajn!). Eble li, leginte la artikolon „la grava problemoj” en la antaŭa numero, komprenas la kialon. En multaj lokoj niaj sekcioj regule kunlaboris kun la lokaj sekcioj de aliaj asocioj aliĝintaj al N.C.K.E. (plej ofte kun sekcioj de F.L.E.) kaj ĝenerale oni ambaŭflanke estas kontenta pri la kunlaboro. En multaj lokoj speciala kunlaborkomitato aranĝis diversajn prelegojn kaj komunajn kunvenojn. Kelkaj sekcioj varbis kontentigan nombron da donacantoj kaj pro tio ili disponis pri mono por propagandaj celoj kaj eĉ povis malaltigi la propran membrokotizon sed bedaŭrinde pluraj sekcioj tute ne klopodis varbi donacantojn. Evidente ili preferas malplenan kason ol iom da laboro. Unu sekcio


kunvenis dufoje en jaro, kelkaj aliaj neregule, la plimulto ĉiun duan semajnon; kelkaj sekcioj eĉ ĉiusemajne. En malgrandaj lokoj (Boskoop, Bozum, Edam) ĉiuj anoj regule ĉeestas la kunvenojn; en la grandaj urboj la vizito al la kunvenoj ofte lasas multon por deziri. Laŭ bona tradicio la sekr. de Culemborg ne skribis eĉ unu leteron kaj ne respondis la demandojn sed ankaŭ la sekretarioj de Almelo (!), Sneek kaj Hengelo ĝis nun ne respondis.

Kursoj: Ankaŭ en 1950 la ĝenerala indiferenteco pri kulturaj celadoj kaj la malbona ekonomia situacio malfavore influis la rezultaton de la propagando. Nur kelkaj sekcioj sukcesis aranĝi kursojn kun kontentiga nombro da partoprenantoj. Kelkaj sekcioj tute ne klopodis aranĝi kursojn. Ĉar ne ĉiuj sekcioj respondis la koncernajn demandojn, estas neeble doni fidindajn informojn pri la nombroj da kursoj kaj kursanoj. Bedaŭrinde kelkaj sekcioj malmalproksimitas kontakton kun la kursanoj. Kvankam nian skriban kurson por komencantoj (teksto de s-ro H. Bakker, kursgvidanto s-ro S. S. de Jong) partoprenis nur malmultaj personoj, ĝi tamen rezultigis modestan monprofiton. Multaj sekcijaj estraroj tute preterlasis propagandon por tiu kurso. Pluraj anoj partoprenis la skriban kurson por progresintoj (gvidanto s-ro H. A. Appel). Pri la someraj kursoj en Arnhem, aranĝitaj en kunlaboro kun Fl. L. E., kiuj partoprenis proks. 80 gesamideanoj, aperis raportoj en la septembra numero de „Nederlanda Esperantisto”.

Kongreso: Nia 17-a kongreso, kiun ĉeestis pli ol 200 gesamideanoj, okazis je Pasko en Groningen. Pro la bona aranĝo ni ŝuldas koran dankon al sekcio Groningen, kiu modele laboris kaj havigis kelkajn neforgesoblajn tagojn al la partoprenintoj. Raporto pri la kongreso kaj jarkunveno aperis en la maja kaj junia numeroj de „Nederlanda Esperantisto”.

„Nederlanda Esperantisto”: Dank’ al la kunlaboro kun „Flandra Ligo Esperantista”, ankaŭ en 1950 nio organo povis regule aperi grandformata. Pri la enhavo aŭdiĝis nur kelkaj plendetoj: ĉiu kompreneble havas sian propran guston. Plej ŝatataj rubrikoj estis „Wereldnieuws”, „La Studento” kaj la ĉefartikoloj. Kelkaj sekcioj preferis duonmonatan organon aŭ duoblan amplekson, sed per niaj modestaj monrimedoj ni bedaŭrinde ne povas fari miraklojn! El la sekcijaj raportoj montriĝis, ke en unu sekcio, la anoj apenaŭ aŭ tute ne legas nian gazeton. La rubriko „komunikoj de la ĉefestraro” unualoke estas destinita por la sekcijaj funkciuloj, ankaŭ por tiuj, kiuj ĝis nun neniam legis ilin. (finota)

L.E.E.N. — F.L.E. AL HILVERSUM!



Kion vi je Pentekosto povos ĝui en Hilversum? Pri la programo ni jam koncize raportis (vidu la januaron numeron) kaj tial ni ĉi foje rakontos al vi ion pri la urbo mem.

Evoluinte ĝis unu el la plej prosperaj komunumoj, ĝi rilate kulturon kaj komercon povas konkuri kun grandaj urboj. Malgraŭ bone asfaltitaj vojoj kaj vaste konstruitaj vilaokvartaloj la urbo — precipe en la centro — konservis iom de la antaŭa vilaĝa karaktero. Trafa atesto pri tio estas la larĝa promenejo Groest kun siaj mallarĝaj zigzagaj flankstratoj.

Trairante ilin vi kelkfoje trovigas subite antaŭ tipa Gojlanda

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 342, Brussel.

Sekretario: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, Sint-Kruis. U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge. P.C. 4161.35 Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Louisastr. 23, Mechelen.

Nia 16-a kongreso

Sur la aliĝilo estas presite ke vi sendu ĝin al la sekretario de la L.K.K. en Hilversum, kune kun la pago, kvankam sur la ricevita cirkulero kaj en la antaŭaj numeroj de F.E. estis petata ke vi sendu la aliĝilon al nia karavanestro. Vi certe jam komprenis ke ambaŭ metodoj estas bonaj, ĉar nia karavanestro transsendas la aliĝilojn. Sed ne forgesu meti sur la slipo de via poŝta pago la detalojn de la sumo: ekz. pago de 220 FR.: (kotizo: 40 FR. + festmango: 37 FR. + du tranoktadoj: 120 FR. + donaco: 23 FR.).

dometo, restaĵo el tempo malnova. Bedaŭrinde oni multon malkonstruis, ĝi devis cedi lokon al la evoluo. Kaj ofte estis ĝuste la plej tipaj vilaĝaj konstruaĵoj, kiujn tiu sorto trafis.

Ĉu necesas ankoraŭ rakonti, ke Hilversum estas la centro de la radiovivo? Kvin belaj studioj troviĝas ĉi tie, unu ankoraŭ pli bela kaj pli bone ekipita ol alia. En la kadro de la kongresprogramo okazos vizito al studio. Ĉar ni havas permeson por limitita nombro da vizitantoj, bonvolu sciigi al la L.K.K., se vi deziras partopreni tiun viziton.

Fakte estas la ĉirkaŭaĵoj de Hilversum, kiuj formas ĝian belecon: la ondanta vasta erikejo, kie horizonte siluetiĝas la preĝejoturoj de ĉirkaŭaj vilaĝoj, la arbaroj kaj la lagoj apudaj, kiuj prezentas veran paradizon al la amantoj de akvosporto.

Bedaŭrinde mankos al vi dum tiu tritaga restado la tempo ĉion esplori, ni esperantistoj en tiuj tagoj ja estas antaŭ ĉio kongresanoj, svarmantaj en kaj ĉe la kongresejo kiel abeloj en abelujo, kaj nur dualoke turistoj.

Turistoj ni estu la trian tagon kiam okazos la granda aŭtobusekskurso. La aŭtobusoj kondukos vin tra la pitoreskaj vilaĝoj Laren, Blaricum, Huizen, nu jes, tra tuta „Gooi”. Tia ekskurso certe valoras financon oferon.

Kun bedaŭro ni devas komuniki, ke la aŭtunaj prezoj de la aŭtobusentreprenejoj ne plu validas; ili eĉ duobliĝis. Enkalkulinte trinkomonon por la ŝoforoj ni nun devas fiksi — kvankam kun sanganta koro — la prezon por la ekskurso je 4 gld. Kiel vi jam scias, la lunĉo konsumota tiun tagon en Zeist kostas 2.25 gld.

Bonvolu mem tion ŝanĝi sur via aliĝilo. Tiuj, kiuj jam pagis, povos alpagi la plialtiĝon en la kongresejo akceptante la dokumentojn, sed prefere ili faciligu la administradon per antaŭa ĝirpago je poŝtkonto 378964 de f-ino S. Visser, Galileistraat 42, Hilversum.

Multaj havas la aliĝilon ankoraŭ hejme. Sendu ĝin baldaŭ al la supre indikita adreso kun samtempa pago.

HIPNOTISMAJ VESPEROJ

Kun la fama - VERDA STELO - ĉiam sukcesas! Ankoraŭ kelkaj liberaj dimanĉoj en tiu sezono. Informoj ĉe la sekr. de Fl. L. E.

Bureau Esperanto bij het Onderwijs

Ondergetekenden hebben de inkomsten en uitgaven van het Bureau „Esperanto bij het Onderwijs” over het jaar 1950 gecontroleerd en alles in orde bevonden. Een woord van dank voor de grote accuratesse, waarmee de heer Baas de financiën van het Bureau heeft beheerd.

A.H. de Hoog. - A. Ridderbos.

Ni instigas ĉiujn aliĝantojn samtempe kun la kotizo pagi la ceterajn arangojn, ĉefe se temas pri tranoktado. La disponeblaj ĉambroj estas tre limigitaj!

Demandaro

Ĉiuj ricevintoj de la demandaro, forsendita komence de februaro, bonvolu tuj resendi ĝin, ĉar ni bezonas kelkajn informojn por kunmeti la jarraporton 1950.

Internaciaj someraj kursoj

Multaj flandroj trovas la bonan vojon al Nederlando por veturi al nia komuna kongreso. Tre verŝajne, ili ne ankoraŭ estos forgesintaj ĝin por ĉeesti la duan komunan arangojn de niaj asocioj, nome la internaciajn somerajn kursojn en Soesterberg, 27 Julio—2 Aŭgusto. Neĝlektante la turistan aspekton, oni povos partopreni tri kursojn (vidu artikolon sur pago 1-a).

La ligo estraro pristudas la eblojn, faciligi la vojaĝon al po unu delegito por ĉiu sekcio.

Plaatselijk Nieuws.

Den Haag: 1-III La teatra klubo prezentas teatraĵetojn kaj kelkaj animoj kantas. 8-III Prelego de s-ino M. de Back-Alerts pri blinduloj. 15-III Prelego de d-ro I. Lapenna en „Schoolmuseum”, Heemsterhuisstr. pri Islando. 22-III Legado kaj tradukado el „Bela Joe”. 29-III Dummitaj travivaĵoj de s-ro A. Nijdam.

Groningen: 8-III S-ro J. de Vries rakontas pri la sukerfabriko. 15-III S-ro P. Nieboer rakontas pri siaj travivaĵoj. 22-III S-ino A. Albers rakontas pri? 29-III Paska ferio.

Hilversum: 8-III La parolvicon havas f-ino G. Leussink. 15-III F-ino S. Visser rakontas pri nederlanda folkloro. 22-III La kongreskomisionoj raportas. 29-III Ĝenerala gluaĵo. Kunportu poton da gluo ĉar ni faros...? En la studhoroj ni revivigos konatajn fabelojn. La rakontadon partoprenos ĉiuj.

V.E.B.-Afdeling Antwerpen: Het programma voor de maand Februari luidde als volgt:

5/2 verscheidene; 12/2 spraakleer; 19/2 zangavond (Diepestr. 44); 26/2 sprekebeurt door Dhr. Meus over Tsjecho-slovakije.

Ons jaarlĳks feestje zal plaats vinden op Zaterdag 14 April 1951 te 20 uur, in ons lokaal Carnotstraat 60. Wij nodigen hartelijk onze vrienden uit Brussel, Mechelen, Brugge en elders uit en hopen dat zij talrijk zullen opkomen.

V.E.B.-Afdeling Brugge.

In Januari hadden we onze algemene jaarvergadering met herkiezing van Bestuur. Op 2 ontslaggevers na zelfde ploeg. Onze voorzitter leidt 2 cursussen (te Brugge en in het Kon. Atheneum te Eeklo voor studenten).

Tijdens de werkvergaderingen altijd bespreking van het belangrijk nieuws uit de Esperanto-wereld. Vooral de bevindingen van Dr Ivo Lapenna hadden onze belangstelling daar we steeds ons best deden een culturele groep te zijn. Voor Maart op het programma: 1-3-51: konkurso pri E-lingva poezio; 8-3-51: Esperantlingva cerbogimnastiko; 15-3-51: konkurso pri fremdlingva poezio; 22-3-51: cerbogimnastiko pri diversaj temoj; 29-3-51: kulturhistoria parolado pri „Renaissance” de D-ro F. Roose. Plie la ĉiusemajna kantado kaj la filmrubriko, la enigmosolvadoj kaj preparolo de ricevitaj korespondadoj. Gvidantoj de la diversaj rubrikaj: A. Dumarey, E. Debaets, G. Bruyneel kaj R. Iserentant.

V.E.B.-Afdeling Gent: Gedurende de maand Januari werd het wekelĳks programma regelmatig afgewerkt. Op 31 Januari had onze jaarlijkse algemene vergadering plaats. Behalve de verslagen van de kassier, de bibliothecaris en de feestleider, hoorden wij een samenvatting van de belangrijkste gebeurtenissen van het jaar 1950. Voor het dienstjaar 1951 werd het Bestuur als volgt samengesteld: voorzitter Mr Mortelmans; ondervoorzitter Mr De Boes; secretaris Mr Van de Velde; kassier Mr De Schepper; feestleider Mr Mertens; bibliothecaris: Mej. Terrijn.

V.E.B.-Afdeling Mechelen: Programma voor Maart: 7/3 enigmoĳ; 14/3 grammatiko; 21/3 prelego de S-ro van Humbeek; 28/3 klarigo pri niaj kongresoj en Hilversum kaj München; la feriaj semajnoj en Soesterberg (Ned.) kaj Helsingör (Danl.).

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris por VEB, post n-roj 99-100: f-ino De Mols, el Mechelen; kaj por LEEN: s-ro D. A. W. Henskes, el Haarlem.

SOLVOJ.

N-ro 101: ŝpari, knedi, kofro, dormo, krevi, talko, najlo, elito, trabo, rando, premo, kordo, kesto dorso, drato, varti, dresi, tremi, speco, drogo, gajno, danco, breto, tikli, harpo, konto, metio, trafi, rasti, morto. Peko kaj eraro estas ecoj de l' homaro.

N-ro 102. *Horiz.* 2. ĉarpi; ebrui. 3. sel. 4. tapiŝ; ŝpini. 6. entreprenem. 7. en 8. maldelikat. 9. da; nek. 10. nei. 11. miregi; grimp. *Vert.* 1. aĉeti. 2. enmanig. 3. fripon. 4. tolerem. 5. disŝir. 6. eternig. 7. velŝip. 8. ruinigi. 9. orkide. 10. nuancig. 11. jubile; te. 12. mi; kapr.

N-ro 103: ŜAJNAN SUFIKSON aldonu al radikoj respondanta al la unua klarigo, por trovi vorton respondantan al la dua. Aldonu:

-ano: 1. blankigilo; piedparto; 2. korpopto; foliforma organika teksaĵo. 3. ludilo; kapvesto. 4. korpopto; fama libro. 5. periodo; ĉasbirdo.

-aro: 1. malsupra parto; magazeno. 2. besto; muka fluo pro malvarmumo. 3. ostoj; rebonigo. 4. publika promenejo; kaperŝipo. 5. haroj; kruĉulo.

-ero: 1. domparto; bretaro. 2. al-tranga ekleziulo; ĝi estas uzata por paki. 3. korpopto; forta malkontento. 4. insekto; tagopto. 5. oreparto; permilita akiro.

-eto: 1. ĝi apartigas partojn de frazo; astro. 2. mangokarto; danco. 3. aŭdebla aer Vibrado; versaĵo. 4. amuziga kunveno; teatra danco. 5. birdo; ŝipo.

N-ro 104: KRUCVORTENIGMO. *Horizontale:* 1. frukto(R); fari libron(R). 2. bleki kiel strigo(R); fiŝo(R). 3. ni logas sur ĝi(R); malgranda papilio(R). 4. lando en Azio(R); legaro(R). 5. skatolo(R); en pli ol sufiĉa kvanto. 6. plezurplena loko(R); streĉi sian fortan por atingi rezulton(R). 7. konjunkcio; metalo(R); maceri linon(R). 8.

| | | | | | | | | | | | | |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|----|
| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 | 12 |
| 1 | V | I | N | B | E | E | F | | V | E | R | K |
| 2 | | L | U | L | | E | G | L | E | S | I | N |
| 3 | | | T | E | P | E | E | T | I | N | E | |
| 4 | | E | R | R | U | | | | | K | O | |
| 5 | U | V | | A | B | V | N | D | A | | C | |
| 6 | | | A | D | E | N | | | | | | E |
| 7 | | | O | L | N | I | F | E | L | | | R |
| 8 | | | E | | | | | | | | | |
| 9 | | | | | | | | | | | | |
| 10 | | | A | | | | | | | | | |
| 11 | | | | | | | | | | | | |
| 12 | | | T | | | | | | | | | |

frukto; birdo(R). 9. ĝi kreskas en ĝardeno(R); ĉina laboristo(R). 10. glatiĝi per varmega ilo(R); prezentanta la laŭlegajn kondiĉojn por regule efiki(R). 11. ligilo(R). 12. stato de ŝajna morto(R); tion oni kelkfoje faras pro timo(R).

Vertikale: 1. birdo(R); speco de tero(R). 2. instrumento(R); sufikso(R); iu kurba fermita linio(R). 3. doni ion por manĝi(R); besto(R). 4. kriad de besto(R); plato el metalo(R). 5. juvela ŝtono(R); parto(R). 6. prefikso; arbeto(R). 7. prefikso; besto(R); ĝi montras proksimecon. 8. direkti parolon al iu(R); plenda ekkrilo(R). 9. riski sumon en konkurado por tia aŭ tia ĉevalo(R); floro(R). 10. havi efektivan rezulton(R); antaŭenirigi objekton turnante ĝin ĉirkaŭ ĝi mem(R). 11. besto(R); lernejo(R). 12. premadante prilabori pastecan substanceton(R); korta birdo(R).

La solvojn sendu la nederlandanoj al S-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstr. 21 h., Amsterdam-Z.; kaj Flandra Ligo al Postbus 342 (Enigmoj), Brussel, antaŭ la 20-III-51.



A. Bögh-Högsted, *Misteroj de l' vivo* noveloj, el la dana trad. C. Graversen, eld. Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj, 1950, 101 p.

La libro enhavas kvin malsame longajn novelojn, nome: *Jakobo Roland, So-So-fie, Lunluma Argentio, La Fremdulo, Lasse*. Ilin ŝajne kunligas, pravigante la titolon, speco de mistera animo-stato de la herooj mem. speco de mistera influo, kiu devenas de ilia interno aŭ de Supera Estajo. Ĝenerale karakterizas ilin ia religio, kiu tamen impresas tre nebule. Ni diru ke la analizo de tiuj „psikajtoj“ estas klara kaj tre kompreneble esprimita, tiel ke la legado restas agrable, kvankam oni facile povus timi enuigon.

La traduko estas bone farita, cetere kontrolita de la Literatura Komitato (de ALE). Tamen haltigis nin kelkaj strangaj frazkonstruoj kaj iam nekomprenebla uzado de la tempoj; ni notis kelkajn erarojn (?); tien kaj reen (ree: p. 7, 49, 54 k.t.p.); estu certe (certa) pri tio, p. 13; daŭrigi paroli (ekz. p. 14 anst. paroli plu); ne estis la unua fojo ke (kiam); p. 15; meti... ĉirkaŭ ŝia animo (ŝian animon: p. 25) idnaskado: ĉu naskado ne sufiĉas, p. 27; sed eviti tion ŝajnis neebla (neeble: p. 28); multon ŝi vidis kion (kiun: p. 63) staras kontraŭ la pordo (ne estis spaco inter la pordo kaj li, do kontraŭ estis erare uzata, p. 68. Ni notis kelkajn neologismojn el kiuj kelkaj estas troveblaj en Parnasa Gvidlibro: *fatraso, rara, surfo, kloŝo* (en la senco de: sonorilo), *bunta*; la tradukinto ankaŭ uzis la finaĵon -io por la landnomoj anst. -ujo. Maloftas la preseraroj. Min frapis kelkaj interesaj esprimoj: *rampi sub la herbota-piŝon (morti); urĝe kuradi pri ĉio kaj nenio; spirigilo, flavbekulo, farunumita, k.t.p.*

Entute do, leginda libro el la vidpunkto tiel de la enhavo kiel de la lingvo: ĝia preso estas klara kaj la bindo fortika.

Hedero.

Paul Bennemann: *Miru-pensuro* / eld. „Heroldo de Esperanto“, estas verko 240-paĝa kun plej varia enhavo kaj vera „enciklopedio“ por tiuj, kiuj serĉas materialon taŭgan por la konversaciaj vesperoj. Por konigi al vi la enhavon de ĉi tiu interesa verko mi citu al vi ĉiun fragmenton el la antaŭparolo: „La libro enhavas multkoloran mozaikon el ĉiuj materioj: el la historio ekde la plej antaŭa pasinta tempo ĝis la plej aktuala nuno: ĝi gvidas tra la tuta mondo kaj ĝis la steloj, en la regnoj de la naturo kaj de la tekniko, en la sciencoj kaj al la mirakloj de la lingvo. Ĝi prezentas ludojn kaj kaprompilojn, enigmojn, problemojn de multaj specoj kaj anekdotoj.“ Same kiel mi, karaj gelegantoj, vi, trinkante el ĉi tiu neelĉerpebla fonto de amuzo kaj instruo, miros pri multaj aferoj kiujn vi ankoraŭ ne sciis, pensos kaj cerbumos pri la ofte tre spritaj problemoj kaj ridos pri la bonhumoraj. Favorprezo de ĉi tiu forte bindita kaj bonstila medikamento kontraŭ malbona humoro ĝis 31/3 g. 4,80; b. fr. 65; post tiu dato g. 5,40; b. fr. 73; havebla ĉe la libroservoj de L.E.E.N. kaj F.L.L.E.

C. Rossetti, *Kredu min, sinjorino!*: taglibro de eksponisto en romanformo (260-paĝa, forte bindita), en kiu la aŭtoro rakontas multajn epizodojn el sia aventurriĉa vivo kiel eksponisto,

epizodojn jen seriozajn, jen amuzajn, kiujn mi gue legis kompatante la „bazarulojn“ kaj eksponistojn, kiuj ofte vivas en malfacilaj cirkonstancoj, ofte kore ridante pro iliaj ruzoj kaj artifikoj, kiujn la aŭtoro priskribas tiamaniere ke oni jam antaŭe pardonas la ruzulojn. Ĉu neniam vi, same kiel Raymond Schwartz, kiu skribis la enkondukajn vortojn por ĉi tiu libro, sur vendoplace gape haltis ĉe la improvizita stando de unu el tiuj langolertaj eksponistoj, kiu per mil artifikaj sukcesas vekoj kaj kateni vian atenton kaj aĉetis de li la „nepre necesan, perfektigitan, patentitan, novan kravattenilon“, kiu poste montrigis neuzeblo? Ĉu neniam vin superruzis kolportisto, kiu sukcesis invadi vian domon por montri (kaj vendi) al vi la plej perfektan polvusĉilon? Sendube vi ŝanĝos post lego de ĉi tiu verko, kiu malkaŝas al vi multajn detalojn el medio verŝajne tute fremda al vi, vian ĝis nun ne tre favoran opinion pri tiaj „trompemaj trudemuloj“. Mi apenaŭ povas rezisti la tenton, citi al vi kelkajn amuzajn fragmentojn el ĉi tiu originala romano por atentigi vin pri la trafa esprimmaniero kaj bona stilo de la aŭtoro. Avide legante ĉi tiun bonstilan romanon mi preskaŭ forgesis pri mia kritikista profesio.

Nu jes, jen kaj jen troviĝas kelkaj makuletoj kaj preseraroj neniam estas tute eviteblaj sed kontraŭe en la libro svarmas la trafaj esprimoj kaj originalaj vortkunmetaĵoj, ekz. plandi de pordo al pordo; tubero en la afero (kink in de kabel); geduo (paartje); petveturi (liften); lanĉi militon; flavbekulo (groentje); troviĝi en la kaĉo; paŝeti okupe; kredu-ne kredu (je kunt het geloven of niet)... sed jam sufiĉe! Vi mem ĝuu ĉi tiun verkon, dankante la eldoniston „Heroldo de Esperanto“ pro tio, ke ĝi ebligis al vi la konatigon kun ĉi tiu aŭtoro, bedaŭrinde mortinta en majo 1950.

Favorprezo ĝis 31/3 g. 4,80; b. fr. 65; post tiu dato g. 5,40; b. fr. 73; havebla ĉe la libroservoj de L.E.E.N. kaj F.L.L.E.

H. Sienkiewicz, *Kaptitaj en Nubio*, trad. el „Durch die Wüste“ frato W. van Zon, eld. Jos M. Krijnen, Vught, 120 p., prezo g. 1,25. Havebla ĉe la libroservo. Recenzota.

Jarlibro de U.E.A. 1951, unua parto, havebla nur por individuaj anoj de U.E.A., 256 p., recenzota.

J. Rostand, *La nuna stato de l' evoluismo*, el la franca trad. J. kaj M. Delacourt, eld. S.A.T., Parizo 1950. 113 p.

Konstitucio de popola respubliko Bulgario, el la bulgara trad. M. Conkovski, eld. Bulg. Esp-ista Kooperativo, Sofia, 1950, 22 p.

Sveda Novelaro, trad. F. Szilagyi, eld. Sveda Lab. Esperanto-Asocio, Barnhusgatan 8, Stockholm, 1951, 235 p. Rezenzota.

La vojo al daŭra paco kaj ĝenerala prospero, broŝuro 4-paĝa, senpage havebla ĉe Int. Union for Landvalue Taxation and Free Trade, 4 Great Smith street, Westminster, London S.W. 1.

V. Setälä kaj E. Borg, *1,2,3... Peĉjo kaj Anjo kalkulas*, 30-paĝa bildlibro por infanoj, eld. V. Setälä, Helsinki.

ANONCETOJ

Ramon Molera, Stro. Hospital 13, Moya (Barna) Hisp. kolektas propagandecojn Esp. poŝtstampojn el ĉiuj landoj kaj rekomencas per hisp. poŝtmarkoj aŭ poŝtstampoj laŭ deziro.

Jos. Vild, faka instruisto, Rokycany 116/11 (Ĉeĥoslov.), deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn.

Jarmila Freibergova, instruistino, Strašice n Rokycan (Ĉeĥoslov.), deziras korespondi, interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj desegnaĵojn de antaŭlernejoj por ekspozicio.

Prof. Giovanni Solinas, Via Emilei, Verona (Italujo) deziras interŝanĝi poŝtmarkojn (kvanto kontraŭ kvanto).

S-ro Besbrugge, Voskenslaan 94, Gent, deziras aĉeti „Leono de Flandrujo“. Kiu volas vendi tiun libron?

Angelo Pilotto, legiano en Indo-Cinujo nr. 7/1775, poŝtsektoro 82006, B.P.M. 422/A, Paris (Francujo), deziras ricevi malnovajn Esp. jurnalajn kaj libretajn.

Mirek Vacek, 21-jara instruisto, Sporilou 1073, Praha XIII, (Ĉeĥoslov.) serĉas gekorespondantojn por siaj kursaĵoj. Certe respondos.

LA FORFLUGINTA KANARIO

Jena vera historio okazis antaŭ multaj jaroj en iu urbo, kies nomon mi ne mencios.

Kiel ĉie en nia lando, ankaŭ en tiu urbo la dommastrinoj komencas en la printempo la dompurigadon. Kiam la vetero mildiĝis, ankaŭ la edzino de la urbestro prenis viŝtukojn, brosojn kaj sitelojn, kaj komenciĝis la grava laboro. Multan akvon ŝi verŝis sur la straton antaŭ la domo, la plankon ŝi poluris per vakso, la tapiĉojn ŝi batpurigis, la librojn de la edzo ŝi prenis el la ŝranko kaj remetis ilin en ĝin renversitaj. Ŝi lavis kaj balais kaj senpolvigis; la servistino fervore helpis ŝin. sed ambaŭ estis malbonhumoraj.

Tiam okazis, ke Sofiĉjo, kiam la sinjorino pormomente ne estis en la ĉambro, intencis purigi la internon de la kaĉo, en kiu logis bela, flava kanario. Ŝi malfermis la pordeton, enmetis la manon kun la viŝtuko; sed ĝuste kiam ŝi eklaboris, ŝi vidis ion flavan forflugantan. Tervure ŝi ekhriegis! Envenis kurante la sinjorino, vidis la malfermitan pordeton kaj ekstere sur branĉo de arbo ion, kio rememorigis ŝin pri ŝia kara kanario. La servistino kulphonscie kaŝis la vizaĝon en la

antaŭtukon.

„Ne estas mia kulpo, sinjorino!“ Ŝi fine balbutis. „La kaĉo mi purigu interne, mi pensis.“

„Vi pensis! Vi servistinoj neniam pensas! Ĉu en via propra domo vi malfermus kaĉon, en kiu estas kanario? Nu, diru, se vi kuragasi!“

Intertempe la kanario sidis sur arbo kaj per sia pepado gajigis la ordinaran popolon surstratan. La sinjorino alparolis tiun popolon kaj promesis dek ormonerojn al tiu, kiu kaptos la besteton. Oni venigis ŝtupetarojn kaj vetkuris, kiu unua atingos la branĉon, kie sidis la flava besto. Jes, sidis, ĉar ĝi ne atendis siajn kaptontojn, sed ekflugis.

En tiu momento la sinjorino ekkomprenis la unuan fojon dum sia vivo, ke nur sinjora saĝo povos helpi ŝin.

„Sofiĉjo,“ ŝi diris, „kuru al la urbdomo kaj petu la urbestran moŝton, ke li tuj venu hejmen!“

Kiel eble plej rapide la knabino kuris al la urbdomo. Oni tuj lasis ŝin iri en la konsilantarejon, ĉar oni rekonis la servistinojn de la urbestra moŝto.

Ekstis silento, kiam ŝi envenis kaj iris al la urbestro, kiu afable demandis: „Nu, mia knabino, kio okazis? Ĉu

la dompurigado ne plu progresas?“

„Ho jes, via sinjora moŝto, sed — la sinjorino salutas vin kaj ŝi petas, ke vi tuj venu hejmen!“

„Certe! Komprenoble! La sinjoraj moŝtoj kontrovos! Mi revenos post minuto!“

La urbestro kaj la servistino kune promenis kiel eble plej rapide. Enveninte en sian hejmon li tie trovis la edzinon ploreganta.

„Ĉu estas tiel dolorige?“ li kompate diris, metante la manon sur ŝian ŝultron.

„La kanario flugis for, kaj ni ne povas kapti ĝin!“

„Kompatinda knabino,“ li diris. „Feliĉe ekzistas urba konsilantaro, kiun ni povas konsulti. Estas gravaj aferoj pritraktataj nun, sed ĉi tio komprenoble estas plej grava! Tion ĉiuj konsilantoj komprenos!“

(finota)

VERSLAG 1950

Algemene Nederlandse Esperanto Examen-Commissie

Uit FLE de heren G. J. Degenkamp, W. F. Kruit en O. Brandsma; uit LEEN de heren Mr A. J. Kalma, F. Weeke en mej. H. M. Mulder (secr.-penningm.), uit NK de heren Fr. W. van Zon, Dr W. J. A. Manders en L. Weyts; uit NCEV de heren H. A. de Hoog (voorz.), R. v. Spronsen en J. U. Hommes.

Gedelegeerde de heer Dr W. van den Ent.

Vier examens werden gehouden, n.l.: 18 Mei (Hemelvaartsdag) Amsterdam en Zwolle; 10 Juni, Den Haag; 4 November, Utrecht.

Statistiek betreffende het aantal candidaten:

| | Aange-meld | | Opge-komen | | Ge-slaagd | |
|----------|------------|----|------------|----|-----------|----|
| | A | B | A | B | A | B |
| A'dam | 50 | 6 | 47 | 6 | 32 | 4 |
| Zwolle | 22 | 7 | 22 | 6 | 14 | 5 |
| Den Haag | 45 | 6 | 43 | 6 | 23 | 3 |
| Utrecht | 36 | 6 | 33 | 5 | 25 | 4 |
| Totaal | 153 | 25 | 145 | 23 | 94 | 16 |

Overzicht over het aantal geslaagden uit de verschillende organisaties:

| | | | | | |
|------|------|-----|----------|------|-----|
| FLE | A 40 | B 3 | NCEV | A 1 | B 1 |
| LEEN | A 26 | B 8 | NoSoBE | A 0 | B 1 |
| NK | A 6 | B 3 | Ongeorg. | A 21 | B 0 |

A-EXAMEN

De commissie zoekt de oorzaak van het betrekkelijk groot aantal afgewezenen in de omstandigheid, dat er blijkbaar cursusleiders zijn, die hun candidaten aan het examen doen deelnemen onmiddellijk na het volgen van een beginnerscursus.

Hoezeer de vertaling Nederlands-Esperanto de kern van dit examen vormt, blijkt uit het feit, dat geen der 51 afgewezenen kandidaten voor dit onderdeel een voldoende cijfer heeft kunnen behalen.

De commissie geeft aan toekomstige kandidaten en hun opleiders de volgende wenken:

1. Men volg de vertaling Esperanto-Nederlands de tekst niet al te letterlijk.
2. De voorgeschreven Esperanto Kresmatio moet geheel gelezen zijn.
3. Voor het onderdeel „Historio“ beperke men zich niet tot het van buiten leren van enkele vragen en antwoorden kort voor het examen.

(finota)

GEEDZIGO

La 10-an de marto geedzigis en Den Burg (Texel) s-ro T. Thiessen kaj f-ino A. Spaans, ambaŭ anoj de L.E.E.N. Nijajn korajn gratulojn!

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-Bond Postbus 342 — Brussel en Ned. Esperantisten-Vereeniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. (Ned.) — Drukkerij Krol, Hoofstraat 31, Uithuizen (Ned.)